# TEJO-aktuale: numero 370, 2013-09-25

## Nova ĉe tejo.org: la TEJO-kalendaroj de junularaj aranĝoj

Nova ĉe http://tejo.org: la TEJO-kalendaroj de junularaj renkontiĝoj. Vidu kiam okazos interesaj okazaĵoj, kaj reklamu la viajn (se vi estas TEJO-membro). http://tejo.org/eo/eventoj

## TEJO SIN PREZENTAS FILME

Ĉiu, kiu interesiĝas pri TEJO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, sed ne povis partopreni la Malferman Tagon de la Centra Oficejo de UEA la 27-an de aprilo, povas nun spekti rete la prelegon, kiun Quentin Weber-Seban tiam faris pri la junulara sekcio de UEA.

La 44-minuta filmo “TEJO sin prezentas” donas vastan superrigardon pri la organiza strukturo, servoj, aranĝoj kaj alia agado de TEJO. Weber-Seban parolis ankaŭ pri sia propra laboro kiel volontulo de TEJO en la Centra Oficejo. Post la prelego li respondis demandojn; ankaŭ tiu parto de la programero estas inkluzivigita en la filmo.

La filmo estis realigita de Franciisco L. Veuthey kaj troviĝas en la Reta Kinejo de UEA en YouTube (http://alturl.com/ij84x) kaj Vimeo (http://vimeo.com/72753070).

## [EDU]-Novaĵoj: Kunigu viajn lernantojn - TEJO-alvoko

Se vi instruas Esperanton al junuloj kaj vi ŝatus ke ili jam dum la kurso havu internacian kontakton, sciu ke vi ne estas sola. Por ke vi estu kunligita kun aliaj grupoj, bonvolu plenigi tiun etan formularon ĝis la 27a de septembro, kaj laŭ la informoj ni klopodos kunligi vin kun la plej taŭgaj aliaj grupoj.

Bonvolu klaki sur la ligilon por plenigi la demandaron: http://tinyurl.com/lernantojkune

Se vi gvidas plurajn kursojn, bonvolu plenigi la demandaron plurfoje.

Se vi ne jam havas grupon, sed ŝatus havi grupon, kaj bezonas helpon, konsilon, ni ankaŭ havas, skribu al edukado ĉe tejo.org. (ĉiuj ideoj, komentoj, demandoj helpas!) Legu pli ĉe la paĝo:http://edukado.net/novajhoj?id=380

## FEDERICO GOBBO PRELEGOS EN LA NOVEMBRA MALFERMA TAGO

La 39-a Malferma Tago de la Centra Oficejo sabaton, la 30-an de novembro, havos kiel la ĉefpreleganton Federico Gobbo, kiu sekvos Wim Jansen kiel profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universiatato de Amsterdamo.

Prof. Gobbo faros du prelegojn. Lia unua temo, “Instrui interlingvistikon hodiaŭ: spertoj kaj konsideroj”, rekte rilatos al lia estonta laboro ĉe la katedro en Amsterdamo kaj reflektos liajn spertojn en la Universitato de Torino. Li ankaŭ celas montri, kiel lingvoplanado, ĉefe pri minoritataj lingvoj, kaj planlingvoj estas konverĝaj temoj. Lia dua prelego, “Lingvoj planitaj por fikcio: kion ni povas lerni?”, temos pri la Klingona, Tolkien-aj lingvoj, Na'vi kaj la lastatempa Dothraki el socilingvistika vidpunkto, kun aparta atento al tio, kion esperantistoj povas lerni el ili.

En la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. Aldone al specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazaro de eperantaĵoj kaj gajni premiojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo. (Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 517, 2013-09-25) Legu pli: http://uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=517#1

## [5-a Junulara E-Semajno] ho, ho, ho, homoj! Jen la longe, pene, sopirante...la aliĝilo pretas!

*Malsukcesa elŝuto.*

### JER 2.0, Budapeŝto, Hungario, 25-27a de oktobro (vendredo-dimanĉo)

Elkora bonvenigo kaj bunta programo atendas vin la lastan semajnfinon de oktobro en Budapeŝto, dum la aŭtuna JER! (Junulara Eo-Renkontiĝo) La loĝejo belegas, la kompanio estos internacia kaj ni planas viglan vivon ĝis la nokto-nokto fin' (kaj plu). Okazos multe da aferoj: pli seriozaj, pripensigaj diskutrondoj, komuna filmumo, (kiel kutime kaj neeviteble/-inde) ludejo kaj gufujo...

Se vi de longa tempo ŝatus partopreni indan, amuzan kaj eĉ malmultkostan Esperanto-aranĝon, tiam tiu ĉi estas la taŭga ŝanco por vi! Ne hezitu: aliĝu antaŭ la 13a de oktobro, por partopreni laŭ la plej favora kotizo! (http://jer.hu)

Amike kaj esperante je baldaŭa renkontiĝo: Saci (Sarolta Bagó, en nomo de la organizanta teamo)

Ps.: Kompreneble, se vi havas ajnan demandon aŭ peton, trankvile kontaktu nin - jer [ĉe] jer [punkto] hu - aŭ rekte min: sarolta [punkto] bago [ĉe] esperanto-junularo [punkto] hu .

### [ret-info] Kiam, kie, kio okazas? - Internacia Esperanto-Kalendaro

*Malsukcesa elŝuto.*

### [EDU]-Novaĵoj: Situacio de Esperanto-instruado en la mondo

En la oficiala monda retlisto de Esperanto-kursoj la 14an de septembro 2013 estas registritaj 47 MOVADAJ KURSOJ, 17 LERNEJAJ KURSOJ KAJ 71 KURSGVIDANTOJ

Laŭ la registritaj informoj nur en 11 landoj okazas movadaj kursoj, kaj nur en 12 lernejaj kursoj. En ambaŭ listo brazilanoj elstaras. Gratulojn al ili.

Sed kiuj estas la aliaj registritaj kursoj? Venu kaj vidu. Eĉ pli gravus scii, kie estas tiuj landoj, kie jes ja okazas kursoj sed ili restas en nekonateco.

Bonvolu registri viajn kursojn por ke ni ekhavu pli realan bildon pri la vera situacio de instruado de Esperanto en la mondo.

Dankon pro via helpo, Katalin Kovats

Legu pli pri la statistikaj detaloj kaj ebloj de registrado ĉe la paĝo: http://edukado.net/novajhoj?id=377

### KOTIZOJ DE UEA POR 2014

En la retejo de UEA troviĝas jam la kotiztabelo de la Asocio por la jaro 2014. Ĝi krome estos dissendita kun la oktobra numero de la revuo “Esperanto” en aparta faldfolio, kiu estas uzebla ankaŭ kiel varbilo de novaj membroj. La Centra Oficejo volonte sendos la folion laŭpete por distribuo en Esperanto-renkontiĝoj aŭ por dissendo kun landaj kaj klubaj bultenoj.

Post tri jaroj kun samaj kotizoj, tiuj por 2014 estas plejparte iom pli altaj por kompensi la okazintan inflacion. La nova kotiztabelo ekvalidos la 1-an de oktobro. Kiu volas eviti la plialtigon, rajtas (re)membriĝi antaŭ la fino de septembro ankoraŭ laŭ la tarifo de 2013. (Plej facile oni profitas de tiu eblo uzante la retan aliĝilon.) Por la kotizo de dumviva membro la ĉi-jara tarifo validos ĝis la fino de decembro.

Ĉi-jare ankaŭ la kotizo de la plej malmultekosta kategorio, Membro kun Gvidlibro (MG), donis la rajton legi la revuon “Esperanto” rete. Tiel estos ankaŭ en 2014. Por la landoj, kies kotizo estas sama kiel por Nederlando, la MG-kotizo estas 11 eŭroj. Por la landoj de la tarifo B tiu kotizo restas sama kiel en 2013, nome 5 eŭroj.

Individuaj membroj povas regajni la kotizon, parte aŭ plene, utiligante sian rajton je 10-procenta rabato ĉe la Libroservo de UEA. Membroj kun Gvidlibro aŭ Jarlibro ricevas la rabaton dufoje dum la jaro. Membroj-Abonantoj, Dumvivaj Membroj kaj Honoraj Membroj ricevas ĝin por ĉiu mendo. Krome, ĉiuj membroj escepte de Membroj kun Gvidlibro rajtas aliĝi al la Universala Kongreso kontraŭ rabatita kotizo.

Reta membroaliĝilo: http://db.uea.org/alighoj/alighilo.php

### Venontaj renkontiĝoj

AUTUNE: venu kun via familio en Greziljono inter la 25a de oktobro kaj la 1a de novembro, http://gresillon.org/autune

OKCITAN-KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO, Val d'Aran, Hispanio, 1an, 2an kaj 3an de novembro, http://esperanto.cat/kongresoj/2013/index.php

Klaĉ-Kunveno Post-Somera 2013 (KKPS), Werkhoven ĉe Utrecht, Nederlando, 1a ĝis 3a de novembro 2013, http://kkps-klaĉkunveno.wikispaces.com/ (skribu ĉ per x-kodo) aŭ https://www.facebook.com/events/128616817332684/136721819855517

Studsabato- en CDELI, La Chaŭ-de-Fonds, Svislando, 16a de novembro 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

Studsabato- en CDELI, La Chaŭ-de-Fonds, Svislando, 14a de decembro 2013, Esperantokursoj kun tri niveloj. Inf.: Nancy Fontannaz, Ruisselet 9, CH-1009 Prilly, Svislando. Rete: nancy.fontannaz ĉe gmail.com kaj http://www.cdeli.org/

30a Internacio Festivalo, Nördlingen, Germanio, 27a de decembro 2013 ĝis 3a de januaro 2014, http://www.internacia-festivalo.de

12-a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken, Germanio, 27a de decembro 2013 ĝis 3a de januaro 2014, http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr

5-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE), 29a de decembro 2013 ĝis 4a de januaro 2014, Kotonuo, Benino, http://mirejo3.blogspot.com

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu